Jaro IV * N.° 47ª

Novembro * 1907

# LA SUNO HISPANA

Direktoro-Administranto ★ Director-Administrador

RAFAEL DUYOS

BUENAVISTA, 21 = VALENCIA

**ENHAVO:** Adiauo kaj saluto.—Sección Oficial.—Defendante la veron.—Nomoj de urboj, riveroj, montoj, promontoroj, alnomoj, k. t. p.—Sección gramatical.—Kanto pri la Procelario.—Eldona Hispana Societo.—La rozeto (poezio).—La ombro.—Noticias del extranjero.—Sonĝoj el Hispanujo.—Bibliografio.—Sensspritaĵoj.—Niaj frataj vizitantoj.—Anoncoj.

## Adiaŭo kaj saluto

Korpreme mi adiaŭdiras la legantojn kaj kolegojn de La Suno Hispana. Mia farto malpermesas al mi daŭrigi ĉi tiun senĉesan laboron kaj mi ne povas trouzi la amikecon kaj bonvolon de tiuj, kiuj tiom helpis min dum mia lasta malsano kaj nuna resaniĝo. Certe, mi ne ĉesos batali kaj labori por nia kara lingvo, kaj se miaj klopodoj ne estos tiel utilaj kaj fruktodonaj, kiel tiuj atingitaj per tiu ĉi gazeto, almenaŭ estos tiel fervoraj.

Al ĉiuj, kiuj faciligis mian taskon mi dankas publike kaj tutkore.

*Aŭgusto Jimenez Loira.*

Paterna (Valencia) Novembro 1907.

* * *

**La nova Redakcio de «La Suno Hispana» sendas fratan saluton al la esperantista gazetaro kaj samideanoj de la tuta mondo.**

## Despedida y saludo

Con sentimiento me despido de los lectores y colegas de La Suno Hispana. Mi estado de salud me impide continuar este incesante trabajo y no puedo abusar de la amistad y buenos deseos de los que tanto me han ayudado durante mi última enfermedad y actual convalecencia. Ciertamente, no dejaré de pelear y trabajar por nuestra querida lengua, y si mis esfuerzos no son tan útiles y fructíferos como los alcanzados por esta revista, á lo menos serán tan fervorosos.

A todos los que me han facilitado mi tarea doy gracias pública y cordialmente.

*Augusto Jiménez Loira.*

Paterna (Valencia) Noviembre 1907.

* * *

**La nueva Redacción de «La Suno Hispana» envía un fraternal saludo á la prensa esperantista y á los correligionarios de todo el mundo.**

# SECCIÓN OFICIAL

## HISPANA SOCIETO P. P. ESPERANTO

Siendo varios los Grupos españoles que pretenden se celebre en su localidad el V Congreso Universal de Esperanto, y con el fin de designar con imparcialidad la que más ventajas ofrezca y reuna mejores condiciones, la Junta Directiva de Hispana Societo p. p. Esperanto decidió en sesión celebrada el 23 de Octubre del presente año, que los Presidentes de los mencionados Grupos que aspiren á organizar el Congreso de 1909, remitan antes del 15 de Febrero un proyecto de organización, en el que se hagan constar los siguientes extremos:

1.° Fecha en que por condiciones especiales de la localidad podría celebrarse el Congreso.

2.° Probabilidad de que determinadas corporaciones oficiales de la población cooperasen eficazmente al mejor éxito de la empresa, bien con subvenciones ó donativos, bien con cesiones de locales, bandas, entrada libre en museos, etc., etc.

3.° Número de alojamientos que la Comisión organizadora se compromete á proporcionar, indicando la totalidad de ellos y subdividiéndolos luego por clases y precios.

4.° Caso de no reunir número suficiente de alojamientos proporcionado al de congresistas probables, medios que podían arbitrarse para una instalación cómoda. (Tomando, por ejemplo, el Congreso de Cambridge, donde se improvisó un comedor para 1.000 congresistas.)

5.° Proyecto de Programa para la celebración del Congreso, indicándose en él las sesiones oficiales, representaciones teatrales, banquetes y cuantos festejos sea dable organizar, haciéndose constar cuáles serían gratuitos y el precio por congresista en los restantes.

6.° Estado demostrativo de los gastos é ingresos que proporcione el Congreso, tomando como base la asistencia de 1.000 congresistas, cuyo *Kongresa Bileto* costaría, como máximo, 10 fr., y los ingresos de aquellos festejos que puedan ser remunerativos.

El Secretario interino,
*Rafael Duyos*

El Presidente,
*Román Ayza*

## AVISO

Según dispone el art. 5.° del Reglamento de Hispana Societo p. p. Esperanto, «la Junta Directiva será elegida anualmente por votación directa de todos los socios que en fin de Diciembre hayan pagado *la cotización del año siguiente*».

Lo que se recuerda á los señores socios que deseen tomar parte en la votación de nueva Junta Directiva, para que remitan dichas cuotas á esta Secretaría (Buenavista, 21, Valencia), la cual publicará en el número de Diciembre de La Suno Hispana la oportuna invitación para la Junta General en que la votación (personal ó por escrito) se haya de verificar.

El Secretario interino,
*Rafael Duyos*

# Defendante la veron

Kvankam ne estas necesa eĉ unu vorto, por ke niaj legantoj komprenu la senpravecon kaj maljustecon, per kiu oni vane atakis la honoron de nia respektinda amiko S.ro Rikardo Codorniu, ni plezure kopias ĉi sube artikoleton publikigitan de la madrida ĵurnalo «El Imparcial», respondanta al la 27ª de Oktobro; ĝi diras la jenon:

KLARIGO

Ni presigas plezure la sekvantan leteron:

«Al Ekscelenca S.ro Ludoviko López-Ballesteros.—Mia distinginda amiko: Mi legis sur kelkaj ĵurnaloj transkribitan sciigon, kiu anoncas la kreon de prohonora tribunalo el la anaro de Arbaristoj, por juĝi Inĝenieron de Arbaroj, ĉion rilatante al antaŭnelongaj parlamentaj diskutoj.

»En la nomo de la Asocio de Inĝenieroj de Arbaroj, kaj laŭ decido de ĝia direktanta komitato, mi petas de vi oni presigu en «El Imparcial» ke ni ne havas sciigojn pri intenco submeti al prohonora tribunalo ian ajn Inĝenieron, nek eksuspektas la ekziston de kaŭzo nek preteksto por tio.

»Al vi, kiel amiko, kaj al via ĵurnalo, kiel ŝatata de ni, mi petas tiun favoron, kaj mi povas certigi al vi, ke la Inĝeniero al kiu oni rilatas estas, laŭ ĉies opinio, la plej perfekta kavaliro, kiu ie ajn povas prezentiĝi. Mi antaŭdankas vin, kaj estas ĉiam via aldonita amiko: *F. Laviña.*—Madrido 26-X-1907.»

Oni nur devas aldiri, ke «España Nueva», de la deputato S.ro Soriano, presigis unue la sciigon, kaj ke la aludita Inĝeniero estas bopatro de la nuna Ministro por Internaj aferoj.

* * *

Nenion ni aldonos al tiu artikoleto. Por ni, la honoro de la Honora Prezidanto de «Hispana Societo» estas elŝirmita kontraŭ ĉiuj perfidaj atakoj; sed ni estis devigataj defendi la veron.

# Defendiendo la verdad

Aunque ni una palabra es necesaria para que nuestros lectores comprendan la sinrazón é injusticia con que en vano se ha atacado al honor de nuestro respetable amigo D. Ricardo Codorníu, con placer copiamos á continuación un artículo publicado en el diario madrileño «El Imparcial», correspondiente al 27 de Octubre; dice lo siguiente:

ACLARACIÓN

Publicamos con mucho gusto la siguiente carta:

«Excmo. Sr. D Luis López Ballesteros.—Mi distinguido amigo: Leo en varios periódicos transcrito un suelto en que se anuncia la formación de tribunal de honor, por el Cuerpo de Ingenieros de Montes, á uno de los de la región de Levante, relacionándolo todo con recientes debates parlamentarios.

»En representación de la Asociación de Ingenieros de Montes y por acuerdo de su Junta directiva, acudo á usted rogándole haga público en «El Imparcial» que no tenemos noticia de que se trate de formar tribunal de honor á ningún ingeniero, ni impresión la más leve de que haya motivo ni pretexto para ello.

»A usted, como amigo, y al periódico, como muy considerado para nosotros, pido este favor, y puedo asegurar a usted, que el ingeniero á que se refiere nos merece á todos el concepto del más perfecto caballero que en parte alguna se pueda presentar. Gracias le anticipo y soy siempre suyo afectísimo amigo, *F. Laviña.*—Madrid 26-X-1907.»

Sólo debemos añadir que publicó el suelto referido «España Nueva», del diputado Sr. Soriano, y el ingeniero á quien se alude es suegro del actual Ministro de la Gobernación.

* * *

Nada añadiremos á ese artículo. Para nosotros el honor del Presidente honorario de «Hispana Societo» está al abrigo de pérfidos ataques; pero estábamos obligados á defender la verdad.

# Nomoj

## de urboj, riveroj, montoj, promontoroj, alnomoj, k. t. p.

Okaze la antaŭnelonga publikigado de broŝureto titolita «Provo de esperanta nomigado de PERSONAJ NOMOJ» ni kuraĝas doni nian opinion pri la ceteraj.

Ni kredas ke oni devas ilin esperantigi, respektante ilian nacian strukturon.

Ni proponas:
nenion fari, se ili finiĝas per *o*;

# Nombres

## de ciudades, ríos, montes, cabos, apellidos, etc.

Con motivo de la reciente publicación de un folletito titulado «Provo de esperanta nomigado de PERSONAJ NOMOJ», nos atrevemos á dar nuestra opinión respecto á los demás.

Creemos que deben traducirse al Esperanto, respetando su estructura nacional.

Proponemos:
nada hacer si acaban en *o;*

Lugo, Toledo, Logroño—Ebro, Duero, Guadiaro—Berrueco, Moncayo, Saracho—Machichaco, Nao, Carboeiro...

aldoni '*o* al ilia fino, se ili finiĝas per kia ajn alia litero

añadir '*o* á sus finales, si terminan por otra letra cualquiera

Valencia'o, Valladolid'o, Mahon'o—Guadalquivir'o, Mijares'o, Francoli'o—Javalambre'o, Irta'o, Urbion'o—Trafalgar'o, Ortegal'o, Finisterre'o...

kaj ne doni al ili la fonetikan sonon el ĉiu lingvo, en la esperantaj tradukoj, ĉar oni pli konas tiajn nomojn skribe ol aŭde, kaj tiu kiu ne scias pri la lingvo al kiu la nomo apartenas kaj sekve ĝian elparolmanieron, facile povas erari.

Sed kiam la skribanto esprimas nomon el sia lingvo aŭ nomon el lingvo tre konata de li, li bone faros, laŭ nia opinio, aldonante inter krampoj la esperantan sonon.

y no darles el sonido fonético de cada lengua, al traducirlos al Esperanto, porque esos nombres se conocen más por escrito que de oirlos, y el que no posee la lengua á la cual el nombre pertenece, y por consiguiente, su manera de pronunciarlo, puede equivocarse fácilmente.

Pero cuando el que escribe expresa un nombre de su idioma muy conocido de él, hará bien, nos parece, añadiendo entre paréntesis el sonido esperanto.

Tuyo (Tujo), Yecla'o (Jekla'o), Saxo (Sakso)—Miño (Minjo), Tajo (Taĥo), Guadalhorce'o (Guadalorce'o)—Saracho (Saraĉo), Javalambre'o (Ĵavalambre'o)—Espichelo (Espiĉelo), Higuera (Igero), Peñas'o (Penjas'o)...

Same oni povus fari pri la alnomoj sed ne aldonante la literon *o* en la fino.

Lo mismo podría hacerse con los apellidos; pero sin añadir la letra *o* al final.

Codorniu (Kodorniu), Seijas (Seiĥas), Guinart (Ginart), Duyos (Dujos), Echevarría (Eĉevaria), Piñó (Pinjo).

Parolante, ni penus doni esperantan fonetikan sonon, ĉar per tia rimedo komuniki la penson, oni povas tuj klarigi kian ajn eraron aŭ malbonan interpreton okazintan.

ĤIMENES LOJRA.

Hablando, procuraríamos dar el sonido fonético esperanto, porque por tal medio de comunicar el pensamiento, se puede en seguida aclarar cualquier error ó mala interpretación habida.

JIMÉNEZ LOIRA.

# SECCIÓN GRAMATICAL

Con este título insertaremos, desde el próximo Enero, una sección constante dedicada á aclarar ó explicar aquellos puntos gramaticales de nuestro idioma que ofrezcan alguna duda á nuestros suscriptores ó lectores.

Firme siempre nuestra inquebrantable decisión de defender en toda su puridad el idioma del Dr. Zamenhof, nuestras contestaciones se fundarán bien en las reglas gramaticales de nuestro idioma auxiliar, bien en las opiniones y consejos emitidos por el Doctor en diversas revistas, ó, en último término, en ejemplos entresacados de sus obras ó las de nuestros mejores escritores.

Esperamos que esta sección, redactada sólo en castellano, será aceptada con agrado por nuestros lectores, y á este fin, y con objeto de preparar con alguna anticipación nuestros trabajos admitimos desde hoy las consultas que se dirijan al

*Sr. Director de* LA SUNO HISPANA, *Buenavista, 21, Valencia.*

belega

# Kanto pri la Procelario

**(El Maksim Gorkij)**

Super la griza ebenaĵo de la maro, la vento kunigas la nubegojn. Inter la nubegoj kaj la maro fiere sin portas la Procelario, simila al nigra filino. Jen la ondon altuŝante per la flugilo, jen kvazaŭ sago superflugante al la nubegoj, ĝi krias, kaj la nubegoj aŭdas ĝojon en la kuraĝa krio de la birdo. En tiu ĉi krio-avido de l' ventego! La forton de l' kolero, la flamon de l' pasio kaj la kredon de la venko aŭdas la nubegoj en tiu ĉi krio. La mevoj ĝemas antaŭ la ventego-ĝemas, ĵetas sin super la maro kaj estas pretaj kaŝi sian teruron pro la ventego en la fundo de la maro. Kaj la kolomboj ankaŭ ĝemas-ne estas al ili atingebla la ĝuo de la vivbatalo: la tondro de l' batoj ilin timigas La malsaĝa pingvino timeme kaŝas sian grasan korpon inter la ŝtonegoj. Nur la fiera Procelario sin portas kuraĝe kaj libere super la griza pro ŝaŭmo maro. Ĉiam pli mallume kaj malalte sin mallevas la nubegoj super la maro, kaj kantas kaj saltas la ondoj alten, renkonte al tondro. La tondro bruegas. En la ŝaŭmo de kolero ĝemas la ondoj, kontraŭ la vento batalante. Jen la vento ĉirkaŭkaptas la ondojn per fortika ĉirkaŭpremo kaj ilin ĵetas, eksvinginte en sovaĝa kolero, sur la ŝtonegojn, polvigante kaj gutetigante la smeraldajn grandegaĵojn. La Procelario sin portas kun la krio; simila al nigra fulmo, kvazaŭ sago, trapikas la nubegojn; la ondŝaŭmon per la flugilo deŝiras. Jen ĝi sin portas kiel demono, fiera, nigra, demono de l' ventego kaj ĝi ridas kaj ploregas... Ĝi la nubegojn mokas, ĝi ploregas pro ĝojo... En kolero de la tondro ĝi, demono akrasenta, jam de longe la lacon sentas; ĝi konvinkiĝis ke ne kaŝas la nubegoj sunon.—Ne, ne kaŝas... Vent' ploregas, tondr' bruegas... Blueflamas amasoj de la nubegoj super la marprofundegaĵo. La maro kaptas la sagojn de la fulmoj kaj en sia akvoturno estingas ilin, la rebriloj de tiuj ĉi fulmoj malaperante volviĝas en la maro kiel fajraj serpentoj. Ventego!... Baldaŭ la ventego ektondros... Jen la kuraĝa Procelario, fiere sin portas inter la fulmoj super la kolere krieganta maro; jen krias la profeto de la venko: «Pli forte ektondru la ventego!»

*Tradukis* OSVALD BEZIN.

# Eldona Hispana Societo

Ĵus oni fondis en Hispanujo societon sub tiu titolo, kies celo estas eldoni verkojn el la plej famaj esperantistoj, ĉu originalajn en Esperanto, ĉu tradukitajn el la plej bonaj hispanaj literaturistoj.

La volumoj de «Eldona Hispana Societo» formos tre ŝatindan bibliotekon kaj malgraŭ la altvaloro de la tekstoj kaj la perfekteco de la eldonado, ili estos vendataj je tre malkara prezo.

La unua libro, kiu ĵus aperis, estas «Edziĝo malarangîta aŭ terura nekompreniĝo» originale verkita de la famkonata esperantisto Vicente Inglada. Ĝi rakontas dialogon inter juna advokato petanta la manon de fraŭlino kaj ŝia patro, ia agento de asekuroj. La interparolado interesa kaj spritega fluas kun mirinda natureco, ridigante ĉiufraze la leganton per sia originala vortludeco kaj pikanteco de la situacio.

Tiu ĉi dialogo kostas nur 0'50 frankojn.

Oni sin turnu por mendoj al la Administracio de tiu ĉi gazeto.

Acaba de fundarse en España una sociedad con este título, cuyo fin es editar obras de los más famosos esperantistas, bien originales en Esperanto, bien traducidas de los mejores literatos españoles.

Los volúmenes de «Eldona Hispana Societo» formarán una apreciada biblioteca, y á pesar del mérito de los textos y del esmero de la edición, serán vendidos á muy bajo precio.

El primer libro, que acaba de aparecer, es «Edziĝo malarangîta aŭ terura nekompreniĝo», original del conocido esperantista Vicente Inglada. En él se relata un diálogo entre un joven abogado que pide la mano de una señorita, y el padre de ella, un agente de seguros. La conversación, interesante é ingeniosa, fluye con admirable naturalidad, haciendo reir al lector en cada frase por sus originales juegos de palabras y lo chistoso de la situación.

Este diálogo cuesta solamente 0'50 pesetas.

Dirigirse para pedidos á la Administración de este periódico.

# LA ROZETO

Ia bela rozeto kreskadis
En granda ĝarden',
Ĉiam ĉarma, modesta kaj ĝoja,
Vivadis sen pen'.

Kiam plenan aĝecon ĝi havis,
Apuda diant'
Sian amon al ĝi petproponis
Kun loga konstant'.

La rozet' ĝin akceptis plej rave,
Kun dolĉa ridet'...
Sed belega knabino tuj venis
Kaj ornamo de nigra hararo
Fariĝis rozet'.

—

Tiel same la revoj en mondo
Pli kreskas kaj pli
Gis alvenas kruela realo,
Kiu ilin renversas senkora
Mokante pri ni.

VICENTE INGLADA.

* * *

# La ombro

(MIRRAKONTO DE ANDERSEN)

El «Dua libro de l' lingvo internacia».

En la varmegaj landoj la suno radias alian varmegon, ol ĉe ni. La homoj ricevas koloron malluman kaj en la plej varmegaj landoj la brula suno faras el ili negrojn. Sed ĝi estis nur la simple varmaj landoj, kien transveturis unu instruita homo el niaj malvarmaj. Li pensis, ke li tie povos ankaŭ promenadi en la stratoj, kiel en lia patrujo, sed tion ĉi li devis baldaŭ malkutimi. Li kaj ĉiuj prudentaj homoj devis trankvile resti en la domo. La kovriloj de l' fenestroj kaj la pordoj restis fermitaj la tutan tagon. Oni povus pensi, ke la tuta domo dormas, aŭ ke neniu estas en la domo. La mallarĝa strato, kie li loĝis, estis ankoraŭ tiel konstruita, ke de l' mateno ĝis la vespero oni havis tie la tutan varmegon de l' suno. La instruita homo el la malvarmaj landoj estis homo juna kaj saĝa homo; al li ŝajnis ke li sidas en brula forno. Tio ĉi lin tre suferigis. Li tute maldikiĝis, kaj eĉ lia ombro fariĝis multe pli malgranda, ol en la patrujo,—ĝi ankaŭ suferis de la suno.

Nur je l' vespero, kiam la suno estis subirinta, ili reviviĝis. Estis efektiva plezuro ĝin vidi. Apenaŭ lumo estis enportita en la ĉambron, la ombro sin eltiris el la tuta muro, ĝis la plafono kaj eĉ iom sur la plafono mem. Ĝi intence faris sin tiel longa, ĝi devis sin eltiri, por ree ricevi fortojn. La instruitulo eliris sur la balkonon, por tie sin eltiri, kaj apenaŭ la steloj ekellumis el la klara etero, li eksentis novan vivon. Sur ĉiuj balkonoj en la strato—kaj en la varmaj landoj ĉiu fenestro havas balkonon—sin montris homoj, ĉar aeron oni bezonas, se oni eĉ kutimis esti bruligata de l' suno. Vivo sin komencis supre kaj malsupre. Tajloroj kaj botistoj,—ĉiuj homoj eliris sur la straton, tabloj kaj seĝoj estis elportataj, lumo brulis ĉie, brulis pli ol mil lumoj; unu

# La sombra

(CUENTO MARAVILLOSO DE ANDERSEN)

Del 2.º libro de la lengua internacional.

En los países cálidos, el sol irradia otro calor que entre nosotros. Los hombres toman un color obscuro, y en los más cálidos, el ardoroso sol los hace negros. Pero eran nada más que simplemente cálidos los países por donde viajaba un hombre instruído de nuestros países fríos. Pensaba él que allí podría pasear también por las calles como en su patria, mas pronto tuvo que desacostumbrarse á ello. Él y todos los hombres prudentes debían quedarse tranquilamente en casa. Las hojas de ventanas y puertas permanecían cerradas durante todo el día. Podía pensarse ó que todos en la casa estaban durmiendo, ó que allí no habitaban. La estrecha calle donde él vivía estaba también de tal manera construída, que desde la mañana hasta la noche se tenía allí todo el ardor del sol. El hombre instruído de los países fríos era joven y un sabio. Parecíale que se hallaba en un horno ardiendo. Esto le hacía sufrir mucho. Se adelgazó por completo, y hasta su sombra se hizo más pequeña que en su patria,—tambien ella sufría por el sol.

Solamente por la tarde, cuando el sol había bajado, revivían. Daba gusto, efectivamente, verla. Apenas la luz había sido introducida en la habitación, la sombra se estiraba por toda la pared hasta el techo, y aun sobre el mismo techo. Se hacía intensamente tan larga, debía estirarse, para de nuevo recibir fuerzas. El erudito salía al balcón para solazarse, y apenas las estrellas comenzaban á brillar en el claro éter, él sentía nueva vida. En todos los balcones de la calle—y en los países cálidos cada ventana tiene su balcón,—dejábanse ver hombres, pues se necesita aire, aun teniendo la costumbre de ser quemado por el sol. Comenzaba la vida arriba y abajo. Sastres y zapateros—todos salían á la calle, se sacaban mesas y sillas, se encendía luz, ardían más de

babilis, alia kantis, kaj la homoj promenis, la veturiloj veturis, la azenoj iris... tin-tin-tin—ĉar ili portis sonorilojn. Tie mortintoj kun kantado estis enterigataj, la knaboj de l'strato bruis, la sonoriloj de l' preĝejoj sonoris, per unu vorto—vivo kaj movado reĝis malsupre sur la strato. Nur en la unu domo, kiu staris rekte kontraŭ la loĝejo de l' alilanda instruitulo, estis tute silente, kaj tamen tie kredeble iu loĝis, ĉar sur la balkono staris floroj, kiuj belege kreskis,—tiel iu kredeble ilin superverŝadis, kaj homoj necese devis tie esti. La pordo kontraŭa estis ankaŭ malfermata je l' vespero, sed tie interne estis mallume, almenaŭ en la antaŭa ĉambro,—el interne estis aŭdata muziko, kiu al la alilanda instruitulo ŝajnis neesprimeble bela. Sed eble ĝi estis tia nur en lia ŝajnevido, ĉar li trovis tie en la varmaj landoj ĉion neesprimeble bela, se nur la malbona suno ne estus. La mastro de l' alilandulo diris, ke li ne scias, kiu loĝas en la kontraŭa domo, ke oni tie ne vidas ja eĉ unu personon, kaj pri la muziko—li trovas ĝin malbele enuiga. «Ĝi estas tiel, kiel se unu ripetas pecon, kiu estas por li tro malfacila, kaj kiun li ne povas ellerni, ĉiam tiu sama peco. «Mi malgraŭ ĉio ĝin venkos» li diras, sed li tamen ĝin ne venkas, kiel ajn longe li ludas».

Unu fojon en nokto la alilandulo vekiĝis; li dormis ĉe malfermita pordo de balkono, la kurtenoj antaŭ la pordo sin dismovis de bloveto de l' vento, kaj al li ŝajnis, ke de la kontraŭa balkono venas mirinda brilo. Ĉiuj floroj brilis en plej belegaj koloroj, kaj en la mezo inter la floroj staris gracia aminda fraŭlino, kiu ŝajne ankaŭ brile radiis. La okuloj de l'instruitulo tute senvidiĝis de tio ĉi, kaj ne estas miro, ĉar li ilin efektive tro forte malfermis, kaj al tio ĉi li ankoraŭ estis dorminta. Per unu salto li estis sur la planko, tre mallaŭte li stariĝis post la kurteno, sed la fraŭlino jam ne estis, la brilo estingiĝis. La floroj pli jam ne brilis,

mil luces; uno charlaba, otro cantaba, y los hombres paseaban, rodaban los carruajes, andaban las caballerías... tin-tin-tin,—pues llevaban campanillos. Allí los muertos eran enterrados con canto, los muchachos de la calle alborotaban, tocaban las campanas de las iglesias, en una palabra, reinaban bajo en la calle la vida y el movimiento. Sólo en la única casa que estaba enfrente mismo de la habitación del sabio extranjero estaba todo en silencio, y sin embargo, es de creer que allí viviese alguien, pues en el balcón había flores que crecían con hermosura. Así, es de creer que alguno las regaba, y necesariamente allí debía haber hombres. La puerta de enfrente estaba también abierta desde la tarde; pero el interior estaba á obscuras, al menos la habitación de delante. Salida del interior se oía una música que al sabio extranjero parecía indeciblemente hermosa. Pero probablemente sería tal á su parecer, pues todo allí, en los países cálidos, lo hubiese encontrado inefablemente bello, si solamente el sol no hubiese sido malo. El huésped del extranjero dijo que él no sabía quién vivía en la casa de enfrente, que allí realmente no se veía ninguna persona, y sobre la música la encontraba él feamente fastidiosa. «Es como si uno repitiese una pieza que es para él demasiado difícil y que no puede aprender, siempre la misma pieza. «A pesar de todo la he de vencer», dice, y sin embargo, no la vence por más que toque».

Una vez por la noche se despertó el extranjero: él dormía junto á la puerta abierta del balcón, las cortinas de la puerta movíanse al suave soplo del aire, y le pareció que del balcón de enfrente venía un admirable resplandor. Todas las flores brillaban con los más hermosos colores, y en medio, entre las flores, de pie, graciosa, una encantadora jeven, la cual, al parecer, despedía también brillantes rayos de luz. Los ojos del sabio quedaron completamente deslumbrados con esto, y no es de admirar, pues en realidad los había abierto demasiado, y además estaba todavía de haber dormido. De un salto estuvo en el suelo, muy que-

mankis por plenigi mian malfeliĉon... Ne serĉu plu. Ili havas ĝin.

Rita. – Almenaŭ tie ĉi...

D.ª Fran.—Mi freneziĝas! (*Ŝi sidiĝas.*)

Rita.—Kaj tiu homo ne senkulpiĝis, nek diris...

D.ª Fran.—Ĵus kiam li ekkomencis klarigi, vi avertis min kaj mi deviĝis reeniri... Sed vi ne scias kiel timeme li parolis, kiel agitata li estis. Lí diris ke per tiu letero mi ekscios la justajn kaŭzojn kiuj devigis lin foriri; ke li skribis ĝin por ke fidebla persono ĝin metu en miajn manojn, ĉar li supozis ke estos por li neeble vidi min Ĉio trompaĵoj, Rita, de malfidulo kiu promesis kion li ne intencis plenumi .. Li venis, renkontis konkuranton kaj diris. Nu mi, kial mi enuigos iun, nek fariĝos mi defendanto de virino? Ekzistas tiom da virinoj! Ŝi edziniĝu! Mi nenion perdas. Mia trankvileco estas pli ŝatinda ol la vivo de tiu malfeliĉulino... Dio mia, pardonu! Pardonu, ĉar mi lin tiel amis!

Rita.—Ho, fraŭlino... (*rigardante la ĉambron de D. Diego*) ŝajnas ke ili venas.

D.ª Fran.—Negrave, lasu min.

Rita.—Sed, se D. Diego vidos vin tiamaniere...

D.ª Fran.—Ĉio jam perdiĝis; kion mi povas timi?... Kaj ĉu vi kredas ke mi havas forton leviĝi?... Ili venu, mi ne zorgas nun pri tio.

## SCENO VII

### D. Diego, Simono, D.ª Francisca, Rita.

SIM.—Komprenite; tio sufiĉas.

D. DIE.—Bone; oni selu tuj la mulon, dum vi tien iros. Se ili foriris, revenu, ekrajdu kaj baldaŭ vi atingos ilin... Ambaŭ tie ĉi; ĉu vi komprenas?... Nu, for, ne perdu tempon! *Ili interparolas apud la pordo de l' ĉambro de D. Diego, kaj Simono foriras tra la centra pordo.*)

SIM.—Mi foriras.

D. DIE.—Tre frumatene vi leviĝis, D.ª Francinjo.

D.ª FRAN.—Jes, sinjoro.

D. DIE.—Ĉu jam alvokis D.ª Irene?

D.ª FRAN.—Ne, sinjoro... Plibone estas ke vi tien iru vidi ĉu ŝi vekiĝis kaj volas sin vesti. (*Rita foriras la ĉambron de D.ª Irene.*)

## SCENO VIII

### D. Diego, D.ª Francisca.

D. DIE.—Ĉu vi ne bone dormis?

D.ª FRAN.—Ne, sinjoro; ĉu vi?

D. DIE.—Nek mi ankaŭ.

D.ª FRAN.—Estis tro varme.

D. DIE.—Ĉu vi estas malsaneta?

D.ª FRAN.—Iomete.

D. DIE.—Kio okazas al vi? (*Li sidiĝas apud D.ª Francisca.*)

D.ª FRAN.—Nenio... iom da... Sed ne... mi bone fartas.

D. DIE.—Io okazas, ĉar mi vidas vin malgaja, plorema, maltrankvila. Kio okazas, Francinjo? Vi scias ke mi tre deziras vian feliĉecon.

D.ª FRAN.—Jes, sinjoro.

D. DIE.—Do, kial vi ne pli konfidas al mi? Ĉu vi ne pensas ke estas por mi granda ĝojo vin komplezi?

D.ª FRAN.—Mi ja scias.

D. DIE.—Nu, kial havante amikon, vi ne malkaŝas al li vian koron?

D.ª FRAN.—Tial ke tio mem devigas min silenti.

D. DIE.—Tio signifas ke mi estas eble kaŭzo de via malĝojo?

D.ª FRAN.—Ne, sinjoro, vi neniel ofendis min... Ne estas vi kiu ofendis min.

D. DIE.—Do, kiu, filino mia?... Venu tien ĉi! (*Li alproksimiĝas plie.*) Ni parolu almenaŭ unu fojon sen elturniĝoj nek sekretoj. Diru al mi, ĉu ne estas vere ke vi rigardadas kun iom da malŝato la edziĝon kiun oni proponas por vi? Kion vi vetas ke, estante libera, vi ne edziniĝus kun mi?

D.ª Fran.—Nek kun alia.

D. Die.—Ĉu estas kredeble ke vi ne konas iun kiu amas vin kaj kiu meritas vian amon?

D.ª Fran.—Ne, sinjoro; ne, sinjoro.

D. Die.—Pensadu bone.

D.ª Fran.—Ne, mi diras al vi, ne.

D. Die.—Ĉu do, mi devas kredi ke vi konservas tian emon por la izoleco en kiu vi edukiĝis, ke vi pliamas la severecon de monaĥinejo ol vivadon...

D.ª Fran.—Neniel, sinjoro, mi neniam tiel pensis.

D. Die.—Mi ne obstinas pli demandi... Sed de tio ĉio kion mi ĵus aŭdis rezultas grava kontraŭdiro. Vi ne havas emon por religia vivado, verŝajne. Vi certigas min ke vi ne plendas pro kaŭzo mia, ke vi estas konvinkita ke mi multege estimas vin, ke vi ne pensas edniziĝi kun alia, kaj ke mi ne devas suspekti ke alia disputu vian manon... Nu, kial vi ploras? kial tiu ĉi grandega malĝojeco, kiu tiel rapide ŝanĝis vian vizaĝon, tiamaniere ke mi apenaŭ konas vin? Ĉu tiuj estas pruvoj ke vi amas nur min, ke vi ĝoje edziniĝos kun mi post malmultaj tagoj? Ĉu tiamaniere sin anoncas gajeco kaj amo? (*La teatro iom post iom lumiĝadis, kvazaŭ tagiĝus.*)

D.ª Fran.—Sed kiel mi inspiras al vi tiajn dubojn?

D. Die.—Kiel do? Se mi ne atentos tiujn konsiderojn, se mi rapidigos la preparadon de nia unui-

ĝo, se via patrino ankoraŭ aprobos, kaj fine alvenos la tago de...

D.ª Fran.—Mi faros kion ordonos mia patrino, kaj mi edziniĝos kun vi.

D. Die.—Kaj poste, Francinjo?

D.ª Fran.—Poste... kaj dum mi vivos, mi estos honesta virino.

D. Die.—Tion mi ne povas dubi... Sed se vi konsideras min kiel tiun kiu devas esti ĝis morto via kunulo kaj via amiko, diru al mi, ĉu tiaj titoloj ne donas al mi rajton meriti ĉe vi pli da konfido? Ĉu mi ne povas koni la kaŭzon de via malĝojo? Ne por kontentigi maldecan sciamon, sed por dediĉi min al mia konsolado, plibonigante vian sorton, vin igante feliĉa, se miaj klopodoj kaj penado tion povos.

D.ª Fran.—Feliĉeco por mi? Tio jam finis.

D. Die.—Kial?

D.ª Fran.—Mi neniam diros kial.

D. Die.—Sed kiel obstina, kiel malsaĝa silento! kiam vi mem devas supozi ke mi iom scias pri tio kio okazas.

D.ª Fran.—Se vi ne scias ĝin, sinjoro don Diego, pro Dio, ne ŝajnigu ĝin scii; kaj se vi efektive ĝin scias, ne demandu al mi.

D. Die.—Bone, tial ke nenio restas por diri, ĉar tiu malĝojo kaj tiuj larmoj estas memvolaj, ni alvenos hodiaŭ Madridon, kaj post unu semajno vi estos mia edzino.

D.ª Fran.—Kaj mi ĝojigos mian patrinon.

D. Die.—Kaj vi vivados malfeliĉa.

D.ª Fran.—Mi ja scias.

D. Die.—Jen estas la fruktoj de edukado. Tio ĉi estas kion oni nomas edukadi konvene knabinon, instrui ŝin neigi kaj kaŝi la pasiojn plej nepekajn per perfida kaŝemo. Oni konsideras ilin honestaj vidante ilin instruitaj pri la maniero silenti kaj mensogi. Oni obstinas ke nek temperamento, nek aĝo, nek animo influu sur la emojn, aŭ ke ilia volo skuiĝu laŭ la kapricoj de tiu kiu ordonas ilin. Ĉio estas permesata al ili, esceptinte sincerecon. Se nur ili ne diras kion ili sentas, se nur ili ŝajniĝas malestimi kion ili plej deziras, se nur ili konsentas elparoli jeson perfidan, malpian, deveno de tiom da skandaloj, jam estas ili dece edukitaj, kaj oni nomas bonega edukado tiun kiu inspiras ĉe ili la timon, la ruzemon, kaj la silenton de sklavo.

D.ª Fran.—Estas vere... Ĉio tio estas certa... Tion oni postulas al ni, tion ni lernas ĉe la instruado kiun ni ricevas. Sed la kaŭzo de mia malĝojo estas multe pli granda.

D. Die.—Ĝi estu kia ĝi estu, filino mia, necese estas ke vi kuraĝiĝu... Se via patrino ekvidos vin tiel, kion ŝi diros? Aŭskultu, ĉar ŝajnas ke ŝi jam leviĝis.

D.ª Fran.—Dio mia!

D. Die.—Jes, D.ª Francinjo, tre konvenas ke vi trankviliĝu iomete... Ne malesperu tiom... Konfidu al Dio... ĉar niaj malĝojoj ne estas ĉiam tiel gravaj kiel pentras ilin nia fantazio... Ekvidu, nur, kia malordo estas tiu ĉi! kia agiteco! kiaj larmoj!

Nu, ĉu vi promesas al mi ke vi prezentos vin kiel... kun iom da trankvileco?... Ĉu ne?

D.ª FRAN.—Kaj vi, sinjoro... vi bone konas la karakteron de mia patrino. Se vi ne defendos min, al kiu mi turnos min? Kiu kompatos tiun ĉi malfeliĉulinon?

D. DIE.—Via bona amiko... Mi... Kiel estas eble ke mi forlasu vin, karulineto, en la stato en kiu vi troviĝas? (*ekkaptante ŝiajn manojn*).

D.ª FRAN.—Ĉu estas vere?

D. DIE.—Vi malmulte konas mian koron.

D.ª FRAN.—Mi bone konas ĝin. (*Ŝi volas genufleksi; D. Diego malhelpas ŝin, kaj ambaŭ leviĝas.*)

D. DIE.—Kion vi faras, infano?

D.ª FRAN.—Mi ne scias... Kiel malmulte meritas tian grandan bonecon, virino tiel nedanka por vi!... Nedanka, ne, malfeliĉa... Ho ve, kiel malfeliĉa mi estas, sinjoro D. Diego!

D. DIE.—Mi bone scias ke vi dankas min kiel vi povas pro la amo kiun mi havas por vi. Lu tuta cetero estis .. kion mi scias?... eraro mia, kaj nenio alia... Sed vi, nepekulino, vi ne estas kulpa.

D.ª FRAN.—Nu, ĉu vi ne venas?

D. DIE.—Nun ne, Francinjo. Post kelkaj minutoj mi tien iros.

D.ª FRAN.—Iru baldaŭ. (*Irante á la ĉambro de D.ª Irene, ŝi revenas kaj, deirante, kisas la manojn de D. Diego.*)

D. DIE.—Jes, mi baldaŭ iros.

## SCENO IX

### Simono, D. Diego.

SIM.—Ili estas tie, sinjoro.

D. DIE.—Kion vi diras?

SIM.—Kiam mi trapasis la pordegon, mi vidis ilin jam rajdantaj malproksime. Mi ekkriegis kaj signaldonis per mantuko; ili haltis kaj tuj kiam mi alvenis kaj diris al la juna sinjoro kion vi ordonis, li returnen venis kaj nun estas malsupre. Mi rekomendis al li ke li ne supreniru ĝis kiam mi avertos lin, pro timo ke estu personoj tie ĉi kaj vi volu ke neniu lin vidu.

D. DIE.—Kion li diris kiam vi donis al li mian ordonon?

SIM.—Eĉ nur unu vorton. Kiel mortinto li estas... Mi ja diris, ne unu solan vorton. Mi malgajiĝis vidante lin tiel...

D. DIE.—Ne komencu jam propeti min por li.

SIM.—Ĉu mi, sinjoro?

D. DIE.—Jes, ĉu mi ne konas vin?... Kompaton!... Li estas fripono.

SIM.—Ĉar mi ne scias kion li faris...

D. DIE.—Li estas fripono kiu forprenos mian vivon... Mi jam diris al vi ke mi ne volas propetulojn.

SIM.—Estas bone, sinjoro. (*Li foriras tra la*

sed ili staris ankoraŭ en ilia antaŭa beleco. La pordo estis ne tute fermita, kaj profunde el interne sonis mallaŭta kaj agrabla muziko, kiu povis naskigi la plej dolĉajn sonĝojn. Tio ĉi estis efektive io mireginda. Kiu povis tie loĝi? Kie estis la eniro? En la partero estis nur magazeno, kaj estis ja neeble, ke la homoj ĉiam trakurus tra tie.

Je unu vespero la alilandulo sidis sur sia balkono, post li en la ĉambro brulis lumo, tial estis tute nature, ke la ombro estis videbla sur la muro de la kontraŭa loĝejo. Tiel ĝi sidis tie inter la floroj sur la balkono, kaj ĉiun fojon, kiam la alilandulo sin movis, la ombro sin ankaŭ movis, ĉar tion ĉi ĝi ordinare faras.

L. L. ZAMENHOF.

(*Daŭrigota.*)

dito se colocó en tras la cortina; pero la niña ya no estaba, el resplandor se apagó. Las flores ya no brillaban; pero se encontraban todavía en su anterior hermosura; la puerta no estaba del todo cerrada, y en el fondo del interior sonaba una suave y agradable música, capaz de producir los más dulces sueños. Esto era, efectivamente, algo maravilloso. ¿Quién podría vivir allí? ¿Dónde estaría la entrada? En el patio había solamente un almacén, y era realmente imposible que las personas pasasen siempre por allí.

Una tarde santóse el extranjero al balcón, tras él, en la habitación brillaba la luz; era, pues, natural, que la sombra fuese visible en la pared de la casa de enfrente. De modo, que se vino ella á colocar sentada entre las flores en el balcón, y cada vez que el extranjero se movía, la sombra también se movía, pues esto sucede de ordinario.

L. L. ZAMENHOF.

(*Se continuará.*)

# Noticias del extranjero

**Inglaterra.**—Comunican de Cambridge, que los éxitos del tercer Congreso han conquistado la población entera; el número de socios de la Esperanta Klubo ha aumentado considerablemente, y figuran en su lista los que antes oponían el frío de su escepticismo al fervor de nuestros propagandistas. Ya se habla de organizar una gran excursión á la ciudad donde se celebre el próximo Congreso.

La Srta. Margaret L. Jones ha fundado en Liverpool, 7, Berry Street, un «Esperanto School & Office», centro instructivo y de información esperanta, y librería.

**Francia.**—Terminadas las vacaciones veraniegas, empiezan de nuevo en nuestra vecina República los trabajos de difusión y propaganda.

El 29 de Septiembre, la «Amicale Esperantiste de Paris» verificó una excursión á Chaville en honor de algunos jóvenes correligionarios que han de marchar á cumplir sus deberes militares, los cuales prometieron divulgar nuestro idioma entre sus futuros camaradas, auxiliados por la excelente revista «Armée et Democratie», que ha empezado á publicar una serie de artículos sobre el Esperanto.

**Alemania.**—El Grupo de Hamburg ha organizado reuniones semanales para conversar en Esperanto.—El de Hannóver ha dado un hermoso ejemplo de laboriosidad continuando sus cursos durante todo el verano.—El curso que explicaba el doctor Blachstein, en Leipzig, terminó con un solemne festejo, en el que fué muy aplaudido

el Sr. Kleindieust por su hermoso discurso en Esperanto, sobre la propaganda entre los estudiantes.—En Lorrach se ha fundado un nuevo Grupo.—Durante el tercer Congreso de Cambridge, la redacción de nuestro colega «Germana Esperantisto» envió diariamente informaciones á 250 periódicos alemanes. «Der Tag» publicó en su número del 20 de Agosto un grabado de la Fitzwilliam-Museum de Cambridge, en el momento en que el Dr. Zamenhof salía de dicho museo.—La opinión pública, según refleja la prensa, se muestra muy favorable en la nación de nuestro futuro Congreso.

En el 16.° Congreso internacional de la Paz, celebrado en Munich, ha obtenido un gran éxito el Esperanto. El resultado de los trabajos realizados por el Sr. Moch fué la aprobación de las siguientes proposiciones:

«1. El Congreso ha visto con agrado que treinta y cinco sociedades pacifistas notificasen á la Oficina Central de Berna encontrarse dispuestas á corresponder en Esperanto. El Congreso recomienda á las demás sociedades que sigan ese ejemplo, y desea que, en el porvenir, las que correspondan en Esperanto sean señaladas con una estrella en la lista de las sociedades pacifistas.

2. Conforme con los deseos manifestados en el 1.°, 9.° y 14.° Congreso de la Paz (referentes al idioma internacional auxiliar), el 16.° expresa su deseo de que se enseñe el Esperanto en las escuelas y que la Oficina de Berna notifique este deseo á los gobiernos.

3. Para disminuir las dificultades y pérdidas de tiempo que se originan en los congresos internacionales por la diversidad de lenguas, desde el próximo Congreso podía usarse el Esperanto en las sesiones, y los discursos no pronunciados en este idioma sólo serán traducidos al Esperanto.»

Las dos primeras proposiciones las aprobó el Congreso por una gran mayoría. La tercera, presentada por los profesores A. Schmidt y W. Forster, motivó una gran discusión, porque ella implicaba una modificación en el reglamento del Congreso. Habló en contra el Sr. Molenaar; pero el profesor Forster le contestó con acierto, apoyado por Moscheles, Moch y G. Amhold. Por fin, el Sr. Lafontaine aconsejó se votara la proposición por partes, y así se hizo, siendo aprobada la primera parte, esto es, hasta las palabras «en las sesiones», y se desechó la segunda.

Visible es el gran éxito obtenido en este Congreso, y los esperantistas debemos mostrarnos satisfechos y felicitar á los que de un modo tan brillante contribuyen á nuestro triunfo.

**Brasil.**—El Congreso esperantista del Brasil, celebrado en Río durante el mes de Julio, fué honrado con la asistencia del Ministro del Interior, el cual presidió la solemne sesión de apertura. En este Congreso se fundó la «Brazila Ligo Esperantista». Se organizaron exámenes para adquirir certificados de capacidad y diplomas de profesor. El Congreso eligió la ciudad de San Paulo para el 2.° Congreso en 1908.

**De todas partes.**—En Firenze se ha fundado la «Esperanto Societá Toscana», cuyo presidente es Albert Dattari, abogado.—El importante catálogo de Boston, *The library and the Bussines Man*, ha abierto una sección especial para el Esperanto y recomienda su uso.—«The Far-Eastern Revievo», uno de los más importantes periódicos de Manila, Shanghai y Yokohama, empieza en su número de Julio la publicación de una gramática completa de Esperanto.—El gobierno de Nueva Zelanda ha establecido un consulado oficial para proporcionar informes sobre el país. Todos los empleados hablan Esperanto y contestarán con gusto á cuantas consultas se les dirijan. La dirección es: Government Tourist office, Christchurch, New Zealand.

NOTA. Como las noticias del extranjero sólo tienen interés para nuestros lecto-

res de España, pues para los demás son conocidas por la revista de su nación, las publicaremos desde hoy sólo en castellano. Las de España seguiremos publicándolas á dos columnas, para que tengan conocimiento los demás países del movimiento esperantista en España. En cambio, la sección bibliográfica la redactaremos sólo en Esperanto, pues únicamente á los que ya conocen el idioma puede interesarles dicha sección.

De este modo reducimos en lo posible las dimensiones de las secciones fijas de esta revista, y podremos dar cabida en sus columnas á artículos literarios ó científicos que hagan amena su lectura.

# Sciigoj

## EL HISPANUJO

Dank'al la fervoraj klopodoj de nia senlaca propagandisto S.ro E. G. Rivero kaj al la multvaloraj helpoj de S.roj Santos Ferreira kaj Fernaud, baldaŭ oni fondos grupon en La Laguna (Canarias).

La Suno Hispana dankas tutkore la novan grupon «Pacaj Batalantoj» de Castellar del Vallés (Barcelona) pro ĝia frata kaj ĝentila saluto.

La Grupo Esperantista de Palma organizis tri kursojn: en la unua aŭ elementa kurso klarigas la «Clave Esperanto Ĉefeĉ» kaj «Unuaj lecionoj de Esperanto» S.roj Rabassa kaj Font; en la dua aŭ meza S.ro Capaz klarigas la «Kurso praktika de Esperanto»; kaj en la tria aŭ supera estas profesoroj S.roj Aris kaj Rosselló, kiuj klarigas la «Lernolibro kaj ekzercoj de Esperanto». La lernantoj, kiuj finos la tri kursojn plensukcese, atingos «Ateston pri lernado». Baldaŭ sinjoro Lladó komencos specialan kurson por sinjorinoj kaj fraŭlinoj.

Nia amiko S.ro Garzón ne haltigis sian propagandan laboron en la Kadiza provinco. Li esperas fondi novan grupon en la Politeknika Lernejo kaj en la ĵurnalo «La Provincia» li publikigis du belajn artikolojn.

La artileria kapitano S.ro José Perogordo faris sukcesan paroladon en Madrido ĉe la «Centro del Ejército y Armada»; tuj li malfermis kurson, kun 48 lernantoj. Ankaŭ ĉe la Ateneo de Madrid komencis kurson kun 38 lernantoj si-

## DE ESPAÑA

Gracias á los fervientes trabajos de nuestro incansable propagandista D. E. G. Rivero, y á la valiosa ayuda de los señores Ferreira y Fernaud, pronto se fundará un Grupo en La Laguna (Canarias).

La Suno Hispana da las gracias la nuevo Grupo «Pacaj Batalantoj» de Castellar del Vallés (Barcelona) por su cortés y fraternal saludo.

El Grupo Esperantista de Palma ha organizado tres cursos: en el primero ó curso elemental explican la «Clave Esperanto Ĉefeĉ» y «Primeras lecciones de Esperanto» los Sres. Rabassa y Font; en el segundo ó medio, el Sr. Capar explica el «Curso práctico de Esperanto»; y en el tercero ó superior, los profesores son los Sres. Aris y Rosselló, y explican el «Manual y Ejercicios de Esperanto». Los alumnos que terminen los tres cursos con éxito alcanzarán el «Certificado de estudios». Pronto el Sr. Lladó empezará un curso especial para señoras y señoritas.

Nuestro amigo Sr. Garzón no ha cesado en sus trabajos de propaganda en la provincia de Cádiz. Espera fundar un nuevo grupo en la Escuela Politécnica, y en el periódico «La Provincia» ha publicado dos hermosos artículos.

El capitán de artillería D. José Perogordo dió con éxito una conferencia en el «Centro del Ejército y Armada», de Madrid; en seguida empezó un curso con 48 discípulos. También en el Ateneo de Madrid empezó un curso con 38 discípu-

njoro Bravo del Barrio, alian ĉe la «Centro de Sociedades Obreras sinjoro Marcilla kaj ĉe ia «Círculo Obrero» sinjoro Cecilia. Niaj Madridaj amikoj multe laboras kaj ni konfide esperas ke ili baldaŭ gajnos la tempon perditan.

Ankaŭ Teruelo vekiĝas por nia afero. Bonaj artikoloj publikigitaj en «El Noticiero Turolense» ebenigis la vojon al niaj propagandistoj, kaj en la Komerca Lernejo S.ro Rojas komencis esperantan kurson. Ni lin gratulas kaj ankaŭ S.ron Julio Belenguer pro iliaj konstantaj laboroj.

En la Valencia ĵurnalo «Las Provincias» aperis artikolo subskribita de sinjoro Morales Sanmartin en kiu oni nomis Esperanton *utopio malbela kaj antipatia.* Ni multe bedaŭras, ke personoj, kiuj neniam eklegis esperantan lernolibron, kaj ne konas la historion, triumfojn kaj celojn de nia helpa lingvo, klopodu por erarigi la publikan opinion. Ili forgesas la vortojn de Tertuliano: «estas indigne malami ion nekonatan, kvankam ĝi estus inda de malamo». En la sama ĵurnalo, S.ro Roman Ayza prave respondis al ĉiuj kontraŭparoloj, kaj ni esperas, ke sinjoro Morales Sanmartin, persono tre klera, komprenos la senpravecon de sia opinio. Li diris veron, kiun ni ne povas nei; ke por bone studi ian nacian literaturon estas necese bone lerni la lingvon en kiu ĝi estis verkita. Sed, ĉu estas eble en nia mallongedaŭra vivo lerni tiom da lingvoj, kiom da naciaj literaturoj? Certe, kiu volas legi Sakespeare kaj studi lian stilon, tiu devas lerni la anglan lingvon. Sed, kion ni faros por legi verkojn el diverslandaj aŭtoroj? Ĉu lerni ĉiujn lingvojn? Esperanto taŭgas tre bone por traduki literaturajn verkojn, kaj se S.ro Morales Sanmartin scius tiun internacian helpan lingvon, verkojn fremdajn ni prezentus al li, esperanten kaj hispanen tradukitajn kaj li tuj konvinkiĝus. S.ro Roman Ayza meritas nian aplaŭdon pro la publikigitaj artikoloj, klaraj kaj konvinkigaj.

los el Sr. Bravo del Barrio; otro en el «Centro de Sociedades Obreras» el señor Marcilla, y en un «Círculo Obrero» el Sr. Cecilia. Mucho trabajan nuestros amigos de Madrid, y esperamos confiadamente que pronto ganarán el tiempo perdido.

También Teruel despierta para nuestra causa. Buenos artículos publicados en «El Noticiero Turolense» allanaron el camino á nuestros propagandistas, y en la Escuela de Comercio el Sr. Rojas empezó un curso de Esperanto. Le felicitamos y también á D. Julio Belenguer por sus constantes trabajos.

En el diario valenciano «Las Provincias» apareció un artículo firmado por el Sr. Morales Sanmartín, en el que se llamaba al Esperanto *utopia antiestética y antipática.* Mucho lamentamos que personas que nunca hojearon un manual de Esperanto y desconocen la historia, triunfos y objetivo de nuestra lengua auxiliar, trabajen para desorientar la opinión pública. Olvidan las palabras de Tertuliano: «es indigno odiar una cosa que no se conoce, aun cuando sea digna de ser odiada». En el mismo diario, D. Román Ayza contestó razonadamente todas las objeciones, y esperamos que el Sr Morales Sanmartín, persona muy ilustrada, comprenderá la sinrazón de sus juicios. Él dijo una verdad, que no podemos negar: que para estudiar bien una literatura nacional es necesario aprender bien la lengua en que ha sido escrita. Pero, ¿acaso es posible, en nuestra breve vida, aprender tantos idiomas como literaturas nacionales? Ciertamente, el que quiera leer á Sakespeare y estudiar su estilo, debe aprender la lengua inglesa. Pero, ¿qué haremos para leer obras de autores de diversas naciones? ¿Aprender todas las lenguas? El Esperanto sirve muy bien para traducir obras literarias, y si el señor Morales Sanmartín supiese este idioma internacional auxiliar, le presentaríamos obras extranjeras traducidas al Esperanto y al castellano, y se convencería en seguida. D. Román Ayza merece nuestro aplauso por los artículos publicados, claros y convincentes.

S.ro Domingo Talens, el Carcagente, kun kelkaj tieaj samideanoj daŭrigas la propagandon en la proksimaj vilaĝoj, per tre sukcesaj ekskursoj.

En Burgos oni malfermis kursojn en la Komerca Ĉambro, en la Normala Lernejo por instruistinoj kaj en la Ĝenerala kaj Teknika Instituto. La tiea gazetaro multe helpas enpresante propagandajn artikolojn kaj anoncojn pri la kursoj.

En «La Acción», de Palafurgell, aperis belan artikolon de nia kara amiko S.ro Hipolito S. Luengo.

D. Domingo Taléns, de Carcagente, con algunos correligionarios, continúa la propaganda en los pueblos cercanos por medio de fructíferas excursiones.

En Burgos se han abierto cursos en la Cámara de Comercio, en la Escuela Normal de Maestras y en el Instituto General y Técnico. Mucho ayuda la prensa de la localidad insertando artículos de propaganda y los anuncios de los cursos.

En «La Acción», de Palafurgell, apareció un hermoso artículo de nuestro querido amigo D. Hipólito S. Luengo.

# Bibliografio

*Kial ili estas famaj?* de Georges Feydeau, tradukita kaj plilongigita de Fernand Doré, prezidanto de la Grupo Esperantista en Troyes.—Prezo: 0'50 fr.—Librairie de l'Esperanto, 15, rue Montmartre. Paris.

Gi tre bele taŭgas, kiel monologo por esti ludata en esperantistaj kunvenoj, kaj la aldonaĵoj de S.ro Doré estas vere spritplenaj kaj aplaŭdindaj.

*Solo de fluto,* de Paul Bilhaud, tradukita kaj ludita de Fernand Doré, prezidanto de la Grupo Esperantista en Troyes.—Prezo, 0'60 fr.—Librairie de l'Esperanto, 15, rue Montmartre, Paris.

Legu, kara leganto, tiun beletan monologon kaj vi ridos pro la penegoj de *eminenta* flutludisto... kiu ne ludas, Do, kvankam vi scias nenion pri muzikarto, vi ludos, antaŭ viaj samideanoj, ne la *fluton*, sed tiun monologon, tiel lerte tradukitan de S.ro Doré.

*Sinjoro Vento kaj Sinjorino Pluvo,* de Paul de Musset, tradukita de Paul Champion.—Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépéde, Paris.

Lerta traduko prezentas hodiaŭ S.ro Champion al la esperantistaro, de tiu bela Musset'a verko, kiun la aŭtoro mem nomas *fabelo de nutristino,* sed ĝin legos plezure ne nur la infanoj sed ankaŭ la plenaĝuloj.

*Kristanaj preĝoj por katolikoj* de fraŭlino Adria Tellini.—Udine—San Rocco, Italujo.—Prezo: 50 ctmoj.

Tiu ĉi preĝaro reliefe presita estas dediĉita al blinduloj. Ĝin sekvos, laŭ promeso de la aŭtorino, aliaj libretoj de humoraĵoj, pensoj, proverboj, fabeloj, rakontoj, k. c., ankaŭ presitaj per alfabeto Braille.

*Paco kaj milito,* de profesoro Charles Richet, prezidanto de la Franca Societo de Arbitracio inter Nacioj, tradukita el franca lingvo kun permeso de la aŭtoro de doktoro Vallienne.—Presa Esperantista Societo.—Prezo: 0'75 frankoj.

Tiu ĉi libro estas la número 6.a de la Libraro Pacifisma eldonata de la societo «Pacifisto».

*Pri Malarmo: Ĥimeroj kaj Realaĵoj—Studoj pri la Haltigo de l'Armadoj.* N.° 1. (Enkonduko), de Gaston Moch, komitatano de l'Internacia Oficejo de Paco, Honora Prezidanto de l'Internacia Instituto de Paco, Prezidanto de l'Esperantista Societo de Paco.—Presa Esperantista Societo.—Prezo: 0'25 frankoj.

Tiu ĉi libro estas la numero 9.ª de la Libraro Pacifisma eldonata de la societo «Pacifisto».

*L'Esperanto.—Où en sommes-nous?* de Gabriel Chavet, sekretario de Esperantista Centra Oficejo.—Librairie de l'Esperanto. Paris.—Prezo: 0'50 fr.

En tiu ĉi broŝuro montras S.ro Chavet kun la aŭtoritateco de sia ofico en la esperantismo la vera stato de nia lingvo en la tuta mondo. France verkita, ĝi taŭgas kiel propagandilo enhavanta multe da interesantaj sciigoj.

*Ĉu unu lingvo internacia aŭ tri?* respondo al S.ro Profesoro Diels de Profesoro Louis Conturat, esperanta traduko de artikolo publikigita en «Deutsche Revue» eldonita de Richard Fieischer.—Esperanto Verlag Moller kaj Borel, Berlin.—Prezo: 0'20 markoj.

Ĉar en kelkaj okazoj estas necese esti bone armitaj por partopreni en la diskutoj kontraŭ la skeptikuloj ni rekomendas al niaj propagandistoj la legadon de tiu verketo, en kiu Prof. Conturat tiel klare kaj logike detruas la argumentojn de nia kontraŭulo S.ro Diels.

*Katolika preĝaro en kiu troviĝas ĉiuj dimanĉaj diservoj kaj la plimulto de la festoj de l'jaro,* latine kaj esperante.—1.ª volumo.—Aprobita de Sia Alta Moŝto M.ro Renou, Ĉefepiskopo de Tours (France).—Eldono de Espero Katolika. Sainte-Radegonde (Indre et Loire), France.

Gia titolo klare montras al niaj legantoj la enhavon de tiu vasta verko, kies esperanta parto estas korekte redaktita.

*La Kalendaro,* originale verkita en Esperanto de Lengyel Pal.—Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépéde, Paris.—Prezo: 0'30 fr.

S.ro Lengyel Pal klarigas en tiu ĉi verketo, per facile komprenebla stilo, kiamaniere oni redaktas kalendaron por ia ajn jaro estinta aŭ estonta; multaj tabeloj kaj ekzemploj faciligas la uzon de la reguloj.

*Pri la homa radiado,* originale verkita de E. Boirac, Rektoro de la Diĵona Universitato.—Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépéde, Paris.—Prezo: 0'25 fr.

Jen leginda broŝureto por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri spirita sugestio kaj telepatio. La eksperimenta hipotezo en ĝi pritraktata taŭgas por imagi aliajn novajn, ĉar nur eksperimente oni povos trudi al la scienco la bestan magnetismon.

*Elektitaj fabeloj de Fratoj Grimm,* tradukis el la germana lingvo D.ro Kabe.—Esperanto Verlag Moller kaj Borel, Berlin.—Prezo: 1'50 markoj.

Se la nomo de la aŭtoro ne estus ja tiel fame konita ĉe la esperantistaro pro liaj ĝisnunaj literaturaj laboroj, ni devus longe paroli en celo konvinki la legantojn pri la klara kaj korekta stilo de la ĵus aperinta verko, sed feliĉe tio estas senutila; la Kabe'aj verkoj ĉiam estas legataj kun plezuro.

★ ★ ★

# Senspritaĵoj

—Paĉjo, ĉu homoj devenas de simioj?
—Jes, fileto.
—Kaj la simioj, el kio ili venas?
La pătro post iometa pripensado.
—Nu, de la arboj.

---

—Kiel? Vi ĉi tie? Ĉu vi ne mortis?
—Sajnas al mi, ke ne, kvankam mankis por tio malmulte.
—Nu, kio okazis? Ĉiuj vin kredis tuj mortonta.
—Vera miraklo, mia kara.., mia kuracisto malsaniĝis!

---

—Ĉu vi rimarkis, bela amikino, la sendankecon de homaro kontraŭ kuracistoj? Nur de tempo al tempo oni starigas tre malofte ian monumenton por honori la memoron de iu el ili.

—Kiel, doktoro!... Ĉu vi forgesas la tombejojn?

V. I.

## NIAJ FRATAJ VIZITANTOJ

*Afrika Esperantisto*, 4, rue du Marche, Alĝer, senpage.
*Amerika Esperantisto*, 1239, Michigan Avenue, Chicago, U. Ŝ. A. fr. 5'25.
*Antauen Esperantistoj!!!* Apartado 927, Lima, Perú, fr. 3.
*Brazila Revuo Esperantista*, rua da Assemblea, 46, Rio de Janeiro, Brazilujo, fr. 6.
*Bulgara Esperantisto*, Administracio de la Bulgara Esperantisto en Sofio Bulgaria, . 1'50.
*Centramerika Esperantisto*, Quezaltenango, Guatemala, fr. 3.
*Ĉasopis Ĉeskych Esperantistu*, Praha II-313 Karlovo Námésti, Bohemujo, Austrujo, fr. 3'75
*Eĥo Esperantista*, aldono de l'Echo, Wilhelmstrasse 29, Berlino, Germanujo, senpage.
*Eksport-Ĵurnalo* Union» Esperanto-Verlags-Gesellschaft, Frankfurt a M. Germanujo, r.
*Esperantisten*, 37, Surbrunnsgatan, Stockolm, Svedujo, fr. 3'50.
*Esperanto*, Mr. Marich Agoston, Ülloi-Ut 59, Budapest, IX, Hungria, Austrujo; k. 3'80
*Esperanto*, 8, rue Bovy-Lysberg, Genevo, Svisujo, fr. 3.
*Espero Katolika*, Mr. Peltier, Sainte-Radegonde (Indre, Loira), Francujo, fr. 5.
*Espero Pacifista*, 26, rue de Chartres, Neuilli-sur-Seine, Francujo, fr. 5.
*Foto-Revuo Internacia*, 118-bis, rue d'Assas, Parizo, Francujo, fr. 5.
*Germana Esperantisto*, 95, Prinzenstrasse, Berlino, Germanujo, ms. 3.
*Helpa Lingvo*, F-ino G. Monster, Osterbrogade 54 B, Kopenhago, Danujo, kr. 1'20.
*Idealo*, Corso Calatafimi, 495, Palermo, Italujo, fr. 3.
*Internacia Socia Revuo*, 45, rue de Saintonge, Paris III^a Francujo, fr. 6.
*Japana Esperantisto*, 3ĉome, Jurakĉo, Kojimaciku, Tokio, Japanujo, fr. 3.
*Juna Esperantisto*, 33 rue Lacépéde, Paris 5.^a, Francujo, fr. 2'50.
*La Esperanta Instruisto*, 85, Fleet-St., London, E. C., fr. 2'50.
*La Belga Sonorilo*, 53, Ten Bosch, Bruxelles, Belgujo, fr. 6.
*La Saksa Esperantisto*, S-ro Fritz Stephan, en Leipzig (Germanujo), fr. 2.
*La Pioniro*, Champion-Reef, Mysore State, South India, Angla, fr. 5.
*Lingvo Internacia*, 33, rue Lacépéde, Paris, V-e, Francujo, fr. 5.

*La Revuo*, 79, Bd St Germain Parizo, Francujo, fr. 7.
*L'Espérantiste*, 4, rue du Gril, Louviers, Eure, Francujo, fr. 4.
*Lumo*, bulgara-esperanto, S-ro Nenkov, rue Gorska, 2299, Tirnovo, Bulgarujo, fr. 2.
*Pola Esperantisto*, 26, Akademicka, Leopolo, Austrujo, fr. 2'50.
*Ruslanda Esperantisto*, Bolŝaja Podjaĉeskaja, 24, St. Petersbourg, Rusujo, fr. 7'50.
*Svisa Espero*, 6, rue du Vieux Collége, Genéve, Svisujo, fr. 2'50.
*Tra la Mondo* (multilustrita), 15 boulevard des Deux Gares, Meudon S. O., Francujo, fr. 8.
*The American Esperanto Journal*, boulevard Station, Boston, Mass., U. Ŝ. A., fr. 5.
*The British Esperantist*, 13, Arundel street, London W. C., Anglujo, fr. 4.
*Verda Stelo*, 3.ª del Relox, 12, México (Distrito Federal), 1 peso.

---

Tipografía Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.

---

# ANONCOJ

ALVOKO.—La Esperantistoj de la tuta mondo, kiuj bonvolos kunhelpi por la konstruo de la memoriga monumento de Julio Verne (la mondfama romanisto) en Amiens, bonvolu sendi la monon al

*D.ro Camille Fournier, 24, rue Jules-Lardievre*
AMIENS *(Somme) Francujo.*

La sekretarioj aŭ prezidantoj de la Esperantistaj Grupoj bonvolu, ankaŭ konigi la monon kaj sendi ĝin al suprenomita sinjoro.

---

GAZETARO ESPERANTISTA. *La Saksa Esperantisto.*—Nun ankaŭ la Saksoj havas propran gazeton, kiu sub tiu titolo aperas ĉiumonate redaktata en germana lingvo kaj Esperanto. La redakcio petas, ke oni alsendu raportojn pri la stato kaj antaŭeniro de Esperanto, kaj sendas, laŭ deziro, al ĉiu esperantisto provnumeron senpage. La abono nur kostas 2 frankojn pojare afrankite. Skribu rekte al la eldonanto, sinjoro redaktoro Fritz Stephan en Leipzig (Germanujo).

Ni estus tre dankaj al tiu sinjoro Redaktoro, se li sendus al ni la 3.an kaj 4.an numerojn, kiujn ni ne ricevis.

* * *

«La Revuo» intencas organizi ĉiumonate esperantan konkurson inter siaj legantoj. Ĝi difinos por ĉiuj konkursoj gravajn premiojn.

---

GRAVA RIMARKO.—Broŝuro, kies verkinto kaŝas sin sub la pseŭdonimo de *Ido* ĵus eliris kun la titolo: *Grammaire complete de la langue internationale par Ido* (Paris, Presejo Chaix), kaj estas sendita al kelkaj esperantistoj, speciale elektitaj.

Tiu verko estas nur ***plagiato*** de la lingvo Esperanto, kies nomo kaj aŭtoro ne estas nomitaj. Tamen la verkinto de tiu lingvo faras al Esperanto diversajn ŝanĝojn en la detaloj; la plimulto da tiuj ŝanĝoj estas jam proponitaj de multaj jaroj en la esperantistaj gazetoj, kaj la aŭtoro simple proprigis ilin al si.

Granda parto da tiuj ŝanĝoj estas diskutebla, eĉ laŭ la teoria vidpunkto, kaj la tuta alpreno de ili forigus de Esperanto ĝiajn ĉefajn kvalitojn, kiel lingvo parolebla.

Ĉiuokaze, estas malaprobinde ke tiu verko, kia ajn estas la merito kiun oni povas doni al ĝi, estas prezentata alie ol sub la titolo de «Projekto de ŝanĝoj al la lingvo Esperanto».